

Esperanto

La Skolta Mondo


A black and white photograph of a birch tree in a mountainous landscape. The tree is in the foreground, with its characteristic white bark and dark lenticels. The background shows a valley with a lake, snow-capped mountains, and a small settlement. The sky is overcast.

trimonata revuo

Voi 5 Nr 2

Majo - Julio 1976

Koloroj en la natura



La apuda fiŝo ne estas la plej bona ekzemplo kiam ni parolas pri koloroj en la naturo - nek la presita bildo, nek la vivanta fiŝo mem, ĉar nia revuo enhavas neniujn kolorojn, kaj tiu fiŝo ankaŭ ne estas kolorbrila.

Ni povus elekti papilion! Tamen, ankaŭ la koloroj de tiu ĉi fiŝo estas grava en la naturo - kaj en ĉi tiu parolo de la koloroj.

La koloroj abundas. En la printempo kaj la somero la naturo sin vestas per la plej riĉa koloraro, - sed ĉu vi iam vidis la montaren en la aŭtuno?

De kie venas la koloroj? Kiel ili fariĝas? Kaj kial kaj kiel ni povas vidi ilin?

Kompreneble - iuj diras - ili estas, kaj ni vidas. Sed tio ne estas klarigo. Kaj la klarigo ne estas tro facila.

Pensu pri la ĉielo. Dum la klara, varma tago ĝi estas blua. Kial? La aero ja estas senkolora?!

Kaj sur la ĉielo vi kelkfoje vidas la ĉielarkon kun ruĝa, oranĝkolora, flava, verda, blua kaj violkolora strioj.

Vi scias, ke la lumo disigas tiel, se vi sendas ĝin tra prismo. Sed provu per koloraj kraĵoj remiksi la kolorojn al blanka! ho ne

vi malsukcesos!


Vi ankaŭ scias, ke en mallumo ĉiuj katoj estas grizaj. Ne, diras iuj, ili nur aspektas grizaj. Sed, fakte, tio estas tute la sama!

Ĉar la koloroj en la naturo fakte devenas el la lumo, kaj kiam lumo mankas, la koloroj ne ekzistas.

La lumo estas elektromagnetaj ondoj kun diversaj ondolongoj kaj ĉiu ondolongo kreas en la okulo imagon de certa koloro. La blanka lumo estas miksaĵo de ĉiuj tiuj ondolongoj, kaj kiam vi translasas la lumon tra prismo, ĝi kurbigas la ondolongojn diversmaniere, laŭ la longeco - kaj jen: la ĉielarko, natura aŭ artefarita.

Kaj jen la kaŭzo de la blua koloro de la ĉielo. La pura aero pli disigas la mallongondajn bluejn lumstriojn, kaj pro tio ili fariĝas plej videblaj.

Sed la koloroj de plantoj kaj



bestoj dependas de io alia:

En la florkronoj kaj folioj estas diversaj "pigmento", kiuj "kreas" la koloron.

Tiuj - ekzemple la klorofilo de la verdaj herboj - aŭĉas ĉiujn lumondojn escepte de la verdaj. La verdaj do respreguliĝas, kaj al ni donas la impreson, ke herbo estas verda.

Sam ĉiuj ruĝaj pigmentoj absorbas ĉion escepte de la ruĝaj kaj donas al la okulo impreson de ruĝa koloro.

Flava floro enhavas pigmentojn kiuj forsuĉas la bluan lumon, sed respregulas ruĝan kaj verdan, kaj tiuj ondcoj kune kreas la impreson de flava koloro.

Blanka floro ne enhavas iun ajn pigmentojn, tiel ke ĉiuj koloroj respreguliĝas.

Sed koloroj ankaŭ povas ekzisti sen tiaj pigmentoj.

Tiel ekzemple la mistere ŝanĝantaj koloroj de perlamoto, aŭ de la maldikega

tavolo de oleo sur akvo. Jes, ankaŭ en la sapoveziko.

La kaŭzo de tio, de la belega kolorludo, estas i.a., ke kelkaj el la lumondoĵ kurbiĝas kaj respreguliĝas kiam ili trafas la supron de la maldika tavolo, dum aliaj kurbiĝas kaj respreguliĝas trafante la malsupron de la tavolo.

Kaj jen tiuj nesamaj respregulitaj lumstrioj samtempe trafas la okulon kaj kreas tiun specifikan impreson, al kiu fenomeno oni donis la nomon interferenco.

Kaj en la okulo:

La diversaj koloroj - t.e. ondlongoj de la lumo - trafas la retinon kaj kreas diversajn elektrajn impulsojn en la nervoj. Tiuj impulsoj iras - pere de la vidnervo - al la malantaŭa parto de la cerbo, kaj kreas la vidimpreson.

Sed la misteron, ke multegaj nevideblaj elektraj impulsoj, kiuj iras de la retino al certaj ĉeloj en la cerbo, tie perceptiĝas kiel nedisigita bildo, jes, bildo en plenaj koloroj - tiun misteron ni ne povas klarigi.

Ni scias, ke la blanka lumokreas la kolorojn per kurbiĝo, disiĝo kaj la absorbiĝo, sed ne kiel la cerbo nun rekreas la bildon el tio.

Kaj - neniu scias, ĉu elia persono havas la saman impreson de la ruĝa koloro, kiun mi havas!

Tiuj ne havas la kapablon vidi tiujn ĉi kolorojn. Ili estas blindaj. Ni kiuj lavas la vidkapablon, devus des pli ĝoji pro ĝi, kaj gardi ĝin.



61. U.K.

De UEA ni ricevis la "Duan Oficialan Bulletinon" pri la Kongreso en Ateno.

Ĝi enhavas la provizoran programon, kiu informas pri laboraj kaj kulturaj aranĝoj kaj pri festoj kaj solenaĵoj.

En la kajero troviĝas ankaŭ utilaj informoj pri vizoj, ĉefe por orienteŭropuloj, pri dogano, prezoj de la fotomaterialo, maldekstra trafiko, trinkmono k s, kaj ni lernas pri la Oficiala Bankedo - ties menuo! - kaj pri la diversaj ekskursoj. Inter la fakaj kunvenoj estas la skolta - kun temo "Organizaj problemoj rilate la laborprogramon 1975/77".

La kajero estas allogilo al alloga loko kaj aranĝo!

HORIZONTO

Ni ricevis la unuajn numerojn de nova revuo:

Horizonto, kultura kaj informa revuo, eldonita de "La Neŭtrala Esperanto Movado".

Ni bedaŭras - sen juĝi - ke okazis eventoj, kiuj kondukis al splitigo, ĉar skismoj ne gvidas al bono, sed ni tutkore bonvensalutas la revuon, kiu eble plenigos truon en nia movado. La literaturaj aŭ kulturaj revuoj ja ne abundas!!

Kuriozaĵo en la dua numero: Bildo montras filatelaĵon, la miniaturo-folio poŝtmarka el la araba Fujeira, kun ses poŝtmarkoj kun Zamenhof, Hodler, Lapenna kaj la Biblio, la Nobla Korano kaj Retoriko.



Ne eblas preterlasi viziton al la glora Partenono sur Akropolo, ekkonstruita en la jaro 448 antaŭ Kristo (do nur nelonge post la morto de Budho) kaj servinta intertempe kiel preĝejo kristana kaj kiel turka moskeo.

Manifesto de la paco

estas titolo de libro, eldonita en Esperanto en Stuttgart 1975.

La germana "Manifest des Friedens" aperis jam 1966, eldonita de Unity School of Christianity, Missouri.

Strange - kiam mi vidas libron kun la vorto Paco en la titolo, mi tre hezitas antaŭ eklegi. La vorto ja estas multrilate misuzata, kaj oni tre, tre ofte trovas, ke la aŭtoro havas tute alian ideon, uzante la vorton, ol oni mem havas.

Precipe tiu fakto montras ĝis kiom la homaro bezonas rekonsciiĝi pri la paco.

La aŭtoroj, Rudolf Zimmer kaj K.O. Schmidt, faris provon vekti la homojn. La libron vi povas mendi ĉe Alfred-Richard Walther, Postfach 3649, D-71 Heilbronn.



NACIAJ REPRESENTANTOJ:

- Aŭstralio: H.J.C.Brendel, 3/119 Kadumba Str., Yeronga -QLD 4104.
- Aŭstrio: f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7 A-2512 Tribuswinkel/
Baden pr. Vieno
s-ro Franz Schwartzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.
- Belgujo: s-ro Gert van Damme, Marie Jose-laan 31,
B 2600 Berchen.
s-ro L.J.VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 11, B-2200 Bergerhout
Poŝtk.to Belga Skolta Esp.-Sekretario 000-0327460-85.
Tel (031)3688.08.
- Brazilio: s-ro Euclides C Soares, Av. Almirante Tamandaré 979, Belem, Para
- Britujo: s-ro C.Bardsley, 42 Westbourne Str., OL9 6AR Ollham, Lancs.
- Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erudavej 30, DK-600 Glostrup.
- Finlandio: s-ino Inja Klemola, Nanna, SF-20660 Linttoinen
- Francujo: s-ro Patrick Devenghele, 57 Av.de Rigny, Appt 64,
F-94360 Ery sur Merne.
- Germanujo: s-ro Georg D. Winkler, Borelastrasse 47, D-41 Duisburg 1.
- Hispanujo: s-ro Pedro Marqueti, P. del Cuervo 3, 5^o planta, Zaragoza.
Tel 252044.
- Irlando: s-ro Frank Dotts, 8 Kilsbury Grove, Dublin 4.
- Italujo: s-ro prof. F Pulone, Via Francipane 8, I-9 019 Sciacca,
Agrigento. Tel 11.198.
- Japanujo: s-ro Satoru Sugiya, Enai Kasewa Sooti K.K. 16, Suckinotyō
Kitata, Osaka.
- Kanio: s-ro John H.F. Boyle, Box 4-1, Forest Ont.
helpa NR: s-ro Paul Roulli, +5, 100th Ave., Roxboro, Queb.
- Maroko-Agadir: peranto s-ro Emilio Mas, 39 Cite des Oiseaux,
Inezgane.
- Nederlandio: s-ro E.J.Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868
- Norvegujo: s-ro E.A.Rostach. Vidu paĝon sub "reaktoro".
- Novzelandio s-ro D.E. Pease, 6a Bay Road St Heliers, Auckland 5
- Portugalujo s-ro J.de Matos Correia, Rua Cidade da Horta, Lote G-5-3^o,
Fontinha, Lisboa 4.
- Svedujo: Peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgr 25, S-11233 Stockholm.
- Usono: s-ro : Allan F Neborn, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J.
07513.

Informoj pri membreco:

En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu el lila kotizon.

Individuaj membroj (Nur en landoj sen N.R.!) Kotizo inkl. abono:

Junuloj ĝis 18 jaraĝ: Ned.gld. 3.30 aŭ egalvaloro.

Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.

Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.I.: Postk. Os 4400, Zaandam, Nederlandio.



(1976/80)

V-19563 | 5



Nun nur trankvile forlasu la kuirejon
Kompetentaj skoltoj transprenas

LA SKOLTA MONDO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj:
1-a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de
Novembro.

REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND

NE ISSN 0037-6558

